# Borobuduro

Borobuduro estas la plej granda budhisma monumento de la mondo. Ĝi situas en la meza Javo proksimume 40 kilometrojn nordokcidente de la urbo Yogyakarta, unu el centroj de tradicia java kulturo. Nuntempe ĝi estas la plej populara turisma atrakcio en Indonezio.

Ĝi estis konstruita en la 8-a jarcento, origine kiel hinduisma templo. Poste, ĝi estis plukonstruita de budhistoj, kaj tiel iĝis budhista stupao. Post la alveno de islamo al Javo, oni ĉesis uzi ĝin, kaj ĝi dum pluraj jarcentoj kaŝiĝis sub kreskaĵoj. Nur en la 19-a jarcento ĝi estis retrovita de koloniistoj.

La historio de tiu ĉi konstruaĵo estas en certa mezuro ĉirkaŭigita per neklaraĵoj. Sciencistoj okupiĝantaj pri la plej malnova historio de la indonezia insularo devas dum sia esplorado ofte fidi al malfacile solveblaj surskriboj gravuritaj en ŝtonon. Tamen, pri la konstruaĵo de Borobuduro konserviĝis nenia surskribo, kiu klarigus la tempon kaj la kaŭzojn de estiĝo, do ĝis nun oni ne eltrovis la precizan jaron, kiam oni komencis kun la konstruado aŭ kiam ĝi estis finita.

Dum la 8-a kaj la 9-a jarcentoj multe evoluis la arkitekturo de la meza Javo, kiu tiutempe fariĝis centro de la potenco en la insulo. Ĝis nun en la areo de 10 $km^2$ konserviĝis pli ol 25 hinduismaj kaj budhismaj temploj, al kiuj apartenas ankaŭ hinduisma komplekso Prambanano.

La konstruadon de Borobuduro komencis regantoj de hinduisma dinastio Sanjaja, sed pli poste ili ĉesis la konstruadon. En la jaro 780 reĝoj de la budhisma dinastio Ŝajlendro ekregis super tiu ĉi regiono, kaj poste daŭrigis en la konstruado. Sed ili adaptis la komplekson al sia mondkoncepto. Tio signifas, ke origine hinduisman konstruaĵon ili ŝanĝis en grandiozan monumenton de budhismo.

La grandiozeco de Borobuduro donas ateston pri la potenco de la regintoj de la dinastio Ŝajlendro. Sciencistoj klopodis elspuri la fonton de tiu ĉi riĉeco. Ekzistas hipotezo, ke java reĝo edzigis sian filon kun filino de reĝo de sumatra Ŝrivijajo, la fama ĉemara regno, kiu priregis surmarajn vojojn kaj komercon en Sumatro kaj Malaja Markolo. Pro la geedziĝo okazis kuniĝo de la dinastioj, kiu kaŭzis grandan la riĉecon de la reĝa familio.

Por la konstruaĵo estis uzita 60.000 $m^3$ da andezito (fajnegrajna vulkana materio) akiritaj el ĉirkaŭaj riveroj. Kvadroj de ŝtono estis kunmetitaj sen mortero eluzante la sistemon de entranĉoj kaj dentigado, kiu certigis al la konstruaĵo certan elastecon kaj firmecon kontraŭ moderaj tremoj de ĉirkaŭa tero. Tiujn ĉi ŝtonojn prilaboris proksimume 200-300 laboristoj kaj multe da metiistoj, kies tasko estis haki en la ŝtonojn reliefojn kaj statuojn. Ŝajnas, ke tiuj ĉi homoj ne ricevis salajron - tiutempe oni laboris en la konstruaĵoj de sanktejoj propravole, por ke oni tiel ricevu meritojn.

Dum la konstrulaboroj minimume dufoje okazis ŝanĝoj en la origina projekto, kiujn kaŭzis nefirma konstruskeleto de la tuta konstruaĵo. Borobuduro estas parte konstruita en artefarita monteto (amasigita argilo). Ĉirkaŭ la jaro 800 tiu ĉi fundamento ne eltenis la pezon de la konstruaĵo kaj la tuta norda parto falis. La konstruintoj estis pro tiu ĉi cirkonstanco devigitaj al certe neĝoja paŝo: ili devis la tutan suban parton de la konstruaĵo (kun la reliefoj bildigantaj surteran vivon, inferon kaj ĉielon) kovri per tavolo de ŝtono. La bazplano de la konstruaĵo pro tio plilarĝiĝis. Tial ankaŭ ŝanĝiĝis la origina koncepto de la konstruaĵo - konstrui sanktejon de piramida formo.

Retpaĝo: www.traduki.de

Teksto: eo.wikipedia.org/wiki/Borobuduro